nia voĉo

madrida esperanto-liceo februaro 2015

## ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La 26-an de januaro okazis la Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo. Jen resumo de la decidoj kaj informoj diskutitaj dum la kunsido:

# MEL kreskas, malrapide, sed kreskas: spite la neeviteblajn forlasojn, la novuloj sufiĉas por atingi kreskon, la rezultato estas +2 membroj.

# La jaro 2014 estis ekonomie ekvilibra (-20,56 €).

# La budĝeto por la jaro 2015 alvenas al 1.600 eŭroj. Elstaras 1.000 € budĝetataj por kontribui al la eldono de la traduko de la verko "Bohemiaj lumoj". La proceduro aprobita konsistos en la aĉeto al la eldonejo Mondial Novjorko de ekzempleroj de la libro, kiun tiu firmao eldonos, kaj kiujn MEL poste vendos. Oni esperas havi ilin por la Hispana Kongreso en Cullera.

# La jarkotizo daŭras sampreze, 12 eŭroj.

# Baldaŭ MEL ŝanĝos sian bankkonton al alia firmao pli socie respondeca, la financa kooperativo Arquia.

# Oni aprobis la raporton de aktivaĵoj de la jaro 2014 kaj oni aprobis la planon por 2015.

Ĉiu ano de MEL rajtas ricevi la oficialan protokolon, petante ĝin al la adreso de Liceo.

## PLANOJ POR PRELEGOJ KAJ AKTIVAĴOJ

Estis anoncita la veno al Madrido de la konata esperantisto István Ertl kun la familio, dum la semajno de la 16-a ĝis la 21-a de tiu ĉi monato februaro. Profitante tiun cirkonstancon, oni organizas paroladon en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, mardon, la 17-an, je la 7-a horo vespere. La titolo estos "Ĉio kion vi ĉiam volis scii je István Ertl sed neniam povis demandi".

Oni probable organizos aliajn renkontojn neformalajn kun István kaj la familio dum tiu semajno, pri kiuj oni interkonsentos tiun tagon.

Inter la 14a kaj 17a de februaro vizitos Madridon la korea esperantisto Lumilo (aŭ Emilio), amiko de nun en nia urbo loĝanta Heroo. Ni provos organizi renkonton kun li dum tiuj tagoj.

Profitante la kampanjon por festi la 60an datrevenon de la rezolucio de UNESKO pri Esperanto, oni reprenis la kontakton kun la kultura asocio Klubo de Amikoj de Unesko (*Club de Amigos de la Unesco de Madrid*, CAUM), kun kiu la madridaj esperantistoj kunlaboris dum multaj jaroj. La unua aktivado interkonsentita estos prelego de la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, en la sidejo de CAUM, pri la nuno kaj estonto de Esperanto. La tago interkonsentita estas la 17-a de marto. En venonta numero de Nia Voĉo oni konfirmos la detalojn, sed dume rezervu tiun tagon.

Dum la Ĝenerala Kunveno oni anoncis, ankoraŭ sen aparta dato, prezenton de nova libro eldonita de SAT-en-Hispanio, "Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo", kompilita kaj tradukita de Miguel Fernández. Dum venontaj semajnoj oni decidos pri la loko kaj tago de publika prezentado de la libro.

## HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 15-an de februaro finiĝas la unua aliĝperiodo por la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la valencia urbo Cullera inter la 1-a kaj 3-a de majo 2015. Vizitu la retejon http://esperantoval.org/cullera2015/, kie troviĝas la aliĝilo al tiu renkontiĝo.

## EN RADIO

Ibiza Blue Radio estas reta radio-elsendejo kiu sin dediĉas al muziko, arto kaj traktado de temoj kiujn oni povus nomi alternativaj aŭ noveraaj. La ĵaŭdon 29-an de januaro Manolo Parra, Juan del Castillo kaj nova lernanto José María de Cuadra estis invititaj partopreni tri-horan rekt-elsendan babiladon kun la parolistino, filologo kaj pliaj tri homoj el tango-ensemblo. La demandoj estis la kutimaj, sufiĉe baznivelaj (ĉu eblas kanti en esperanto), kaj ĉiuj montris favoran sintenon. Menciiĝis la datumoj de HEF, la retaj rimedoj por memlerno kaj la ĉeesta kurso de Juan en la HEF-ejo. La babilado verŝajne estos baldaŭ trovebla en la paĝo pri podkastoj de la retejo de la radio http://www.ibizablueradio.com/

Nia juna aktivulo Alex Escobedo estis invitita partopreni programon en la radio Onda Latina. La intervjuo okazos la mardon, 3-an de februaro, je la 6-a vespere en la programo "Al fondo a la izquierda".

La radio elsendas en la frekvenco 87.6 FM kaj estas ankaŭ aŭskultebla en la reteja adreso http://www.ondalatina.com.es/, kaj podkaste en la adresoj http://ondalatinalive.podomatic.com kaj http://www.ivoox.com/podcast-podcast-onda-latina_sq_f1120923_1.html.

## INFORMOJ PRI MEL

Madrida Esperanto-Liceo havas nun paĝon en la fama socia retejo *Facebook* (Fejsbuko aŭ Vizaĝlibro). Ĝia adreso estas https://www.facebook.com/pages/Liceo-de-Esperanto-de-Madrid/339135572945862. Se vi havas konton en tiu reto, ne forgesu ŝati ĝin kaj sekvi la novaĵojn!

Ne forgesu rekotizi por la jaro 2015 se vi ankoraŭ ne faris. La jara kotizo plu restas je 12 eŭroj (apenaŭ po 1 € monate), pagebla per la konto de Esperanto-Liceo de Madrid ĉe la banko Sabadell: 0081-7110-98-000 126 6730; aŭ rekte al ajna membro de la estraro.

Por tiuj ankoraŭ ne membrantaj, oni trovos la aliĝilon ĉe la paĝo de MEL http://www.esperanto.es/MEL/.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.



En januaro la unuasabataj renkontoj okazis en benjetejo (*churrería*), kun rimarkinda nombro da partoprenantoj. Oni do planas ripeti la sperton por venonta sabato, la 7-an de februaro. La loko nomiĝas *Patuchurros*, en la strato Eros, 7 proksime al metro- kaj trajn-stacio Méndez Álvaro. Atentu la informojn kaj konkretigojn per la sociaj komunikiloj kaze ke estu ŝanĝo.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj la Fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com